iĝas *Mainz*. La arkiepiskopo de Moguntio forte gravis en la germana historio, ĉar li kunelektis la germanan imperiestron.

Montokasino / *Monte Cassino* : Origina monaĥejo de la ordeno de la benediktanoj, nomata laŭ *Benedikt de Nursia*, kiu ne nur fondis ĉi tiun religian komunumon en la jaro 529, sed ankaŭ la monaĥejon sur ĉi tiu monto, situanta en la itala montaro Apeninoj. Laŭ ĝiaj reguloj estis poste fonditaj multaj aliaj monaĥejoj kiel ekz. *Fulda*.

Neŭstrio : Okcidenta parto de la franka regno kun la ĉefurboj Parizo kaj *Soissons*. La nomo signifas "nova lando". Ĝi preskaŭ kongruas kun la centro de nuna Francujo.

Orient-romia imperio : La Romian Imperion, ĉirkaŭantan la Mediteraneon, disdividis imperiestro *Theodosius* en 395 en du partojn, la okcidentan kun Romo kiel ĉefurbo kaj la orientan, kies ĉefurbo estis Konstantinopolo, la nuna *Istanbul*. Okcidenta Romio disfalis cent jarojn poste en diversajn partojn. Orienta Romio rezistis dum mil jaroj (ĝis 1453). Dum la bonifaca tempo apartenis al ĝi preskaŭ la tuta balkana duoninsulo, Anatolio (hodiaŭ: Turkujo) kaj partoj de Italujo.

Paliumo : Vestaĵa insigno de la papo kaj de la arkiepiskopoj, konsistanta el blanklana rubando kun ses nigraj krucoj. Ĝi estas portata ĉirkaŭ la kolo kun du malsupren pendantaj strioj sur la brusto kaj sur la dorso.

Pipina donacaĵo : Donaco de reĝo Pipino (de Frankujo) al la papo Stefano II-a per teritorioj en norda kaj meza Italujo (753). En tiuj regionoj, ampleksantan la urbon *Ravenna* kaj zonon tra meza Italujo (kun Romo) la papo regis memstare kiel suvereno, protektata de Pipino respektive de ties posteulo. Per tio fondiĝis la Vatikana (aŭ papa) Regno, ekzistanta ĝis 1860, kiam Italujo unuiĝis. (La nuna Vatikana Regno ampleksas nur kvartalon de la urbo Romo ĉirkaŭ la katedralo St. Petro.)

Saraceno(j) : Dum la kristana mezepoko tiel estas nomataj ĉiuj araboj kaj islamanoj, kiuj invadis kristanajn landojn okupante kaj regante.

Literaturo

Th. Schieffer. Winfried-Bonifatius und die christliche Grundlegung Europas (Vinfrid-Bonifaco kaj la kristana fundamentigo de Eŭropo). *Wissenschaftliche Buchgesellschaft, Darmstadt, 1972 (germanlingva)*

Reinhold Rau : Bonifatii epistolae. Willibaldi vita Bonifatii. (Briefe des Bonifatius. Willibalds Leben des Bonifatius) (Leteroj de Bonifaco. Vivo de Bonifaco skribita de Vilibaldo). En: *Ausgewählte Quellen zur deutschen Geschichte des Mittelalters. Freiherr vom Stein - Gedächtnisausgabe* (Elektitaj fontoj al la germana historio de la mezepoko. Eldono memore al barono vom Stein). Eldonita de *Rudolf Buchner* lige kun multaj fakuloj, Vol IV b, 1968 (parte latina, parte germanlingva)

Adreso de la aŭtoro:

Gerhard KALKHOF
An der Ritsch 17
DE - 36341 - Lauterbach / Germanio

Priaŭtora informo:

S-ro *Kalkhof* estas emerita instruisto mezlerneja. Ĉi tiun gradon li akiris antaŭ 30 jaroj en la fako "Historio"; krome li forte okupiĝis pri loka historio: interalie li verkis dikvoluman historion de sia iama oficloko *Ilbeshausen-Hochwaldhausen*. Kiel esperantisto li verkis jam kelkajn historiaĵojn por Scienca Revuo. Al tio antaŭ kelkaj jaroj necesis dusemestra historia studado per radio-kurso universitata.

Scienca Revuo Vol. 51 (2000) (3)

Psikolingvistika taksado de vortofarado de *mal*-vortoj en Esperanto: Apliko al franclingvanoj [1]

NAGATA Hiroshi
Okajama Universitato

Resumo

Tiu ĉi studo esploras la distribuon de la prefikso *mal-* en Esperantaj adjektivoj kaj verboj el du flankoj: lingvistika markiteco kaj juĝado de parolantoj. Kvindek franclingvanoj juĝis 40 parojn da kontraŭaj vortoj pri tio, kiu el du kontraŭaj vortoj estas primara. Analizo montris, ke distribuo de *mal-* konvenis plejparte al la lingvistika markiteco kaj/aŭ al la juĝadoj de parolantoj. Tamen ankaŭ troviĝis kelkaj vortoj, kiuj kontraŭstaris al la lingvistika markiteco kaj/aŭ al la juĝadoj. La influo de la franca sur la vortofarado de *mal*-kontraŭvortoj estis rimarkebla; tamen la rolo de frekvenco kiel faktoro determinanta radikon de *mal*-kontraŭvortoj estis neklara.

Enkonduko

La prefikso *mal-* en Esperanto signifas "rektan kontraŭaĵon de la ideo" (*Zamenhof*, 1887, p.233). Tiu ĉi prefikso, same kiel aliaj prefiksoj kaj sufiksoj, sendube plenumas gravan rolon en vortofarado en Esperanto, ŝparante la nombron de radikvortoj kaj sekve helpante facilan lernadon de la lingvo. Antaŭaj konsideroj pri la prefiksigo per *mal-* koncernas plejparte stilajn malavantaĵojn kiuj okazas pro oftega uzado de la prefikso (ekz. *Waringhien*, 1959; *Kalocsay & Waringhien*, 1985). Tiuj malavantaĝoj inkludas, ekzemple, longecon kaj pezecon de *mal*-vortoj kaj monotonecon de la stilo kiu entenas tro da *mal*-vortoj. Malmultaj tamen estas konsideroj pri kiu el la du kontraŭaj vortoj rilatigeblaj per *mal-* rajtas stari kiel la radiko. *Waringhien* (1959) nur mencias, ke *Zamenhof* "rigardis la kunmetadon per mal- nur kiel helpan rimedon por esprimi ideon, por kiu ne ekzistas vere internacia radiko" (p. 247).

Antaŭ pli ol dudek jaroj *Nagata* (1977) esploris la prefiksigon per *mal-* el du flankoj, lingvistika kaj psikologia. Ĉe lingvistika flanko, li uzis la dis-

tingon laŭ *Greenberg* (1966), "markita" (angle: *marked*) kaj "ne-markita" (*unmarked*), testante ĉu du kontraŭaj vortoj lingvistike rilatigeblaj per *mal-* (ekde nun simple nomota "*mal*-kontraŭvortoj") estas klarigeblaj per tiu ĉi koncepto. Pli precize, li alprenis unu el la kriterioj por markiteco, t.e. kunteksta neŭtraligo (angle: *contextual neutralization*), kiun entenas en si la ne-markita membro de kontraŭaj vortoj. Kunteksta neŭtraligo klariĝas unuflanke per la fakto, ke la ne-markita membro de la paro de kontraŭaj vortoj neŭtraligeblas en iu kunteksto. Ekzemple la demando: "Kiom *longa* estas la rivero?" antaŭsupozas nenian taksadon de la rivero, dum la demando: "Kiom *mallonga* estas la rivero?" implicas ke la rivero jam estas perceptita "mallonga". Aliflanke ĝi klariĝas per la fakto, ke la ne-markita membro povas servi kiel la nomo de ties koncerna skalo, "longo" ĉi-okaze. Tiele la nomo de du skaloj, *longa-mallonga* kaj *alta-malalta*, respondas respektive al longo kaj alto; oni nek povas nomi la du skalojn "mallongo" nek "malalto".

Vortomaterialoj, kiujn uzis *Nagata* (1977), devenis plejparte de *Hamilton & Deese* (1971). Ili klasifikis diversajn adjektivojn en tri klasojn. La unua klaso kontentigis ambaŭ suprajn kriteriojn de kunteksta neŭtraligo; la dua kongruis unu el la du kriterioj; kaj la lasta plenumis neniun kriterion. *Nagata* (1977) aldonis al la vortomaterialoj aliajn adjektivojn kaj verbojn en kiuj du kontraŭaj vortoj estas ligitaj per *mal-*. Analizo de vortofarado montris, ke 12 el 18 adjektivoj plenumantaj ambaŭ kriteriojn sin konformis al la lingvistika markiteco, kvankam tri paroj da *mal*-kontraŭvortoj ne estis konformaj al la markiteco. Por aliaj tri paroj estis preskribitaj apartaj vortoj; tiuj ĉi lastaj tri paroj da kontraŭaj vortoj do estis ne ligitaj inter si per *mal-*. Du paroj da adjektivoj plenumantaj unu el la du kriterioj konformiĝis al la lingvistika markiteco, dum tri aliaj ne.

Nagata (1977) ankaŭ testis, ĉu parolantoj de la japana lingvo povas juĝi ne-markitajn membrojn pli primaraj ol la markitajn: primara en la senco, ke, se unu membro de la paro estas elektita, tiam la alia sekvas aŭtomate. Trovaĵoj montris, ke 13 el 18 ne-markitaj membroj de la adjektivoj plenumantaj ambaŭ kriteriojn estis juĝitaj kiel primaraj, kvankam inter tiuj 13 ne-markitaj membroj troviĝis du membroj kiuj portis la prefikson *mal-*. Du el kvin adjektivoj trafantaj unu kriterion juĝis japanlingvanoj kontraŭe al la lingvistika markiteco, dum troviĝis nur unu kiun ili juĝis konforme al ĝi. Iliaj juĝadoj *kaj* pri kvar paroj da adjektivoj kiuj kongruis kun neniu kriterio *kaj* pri du paroj da verboj estis konformaj al Esperanta vortofarado. Ĉar evidentiĝis, ke la lingvistika markiteco nek plene klarigis la distribuon de prefiksigo per *mal-*, nek la distribuon de subjektivaj juĝadoj de japanlingvanoj, tial *Nagata* (1977) provis determini la taŭgecon de du aliaj klarigalternativoj. Unu koncernis lingvistikan spacon (angle: *linguistic space: L-space*)[2] kaj la alia koncernis semantikan trajton de taksebleco (*evaluative*

feature) entenita de vortoj.[3] Tamen, eĉ tiuj ĉi du alternativoj montriĝis ne tute sufiĉaj.

La nuna studo provas repliki la antaŭan studon (*Nagata*, 1977) ĉe parolantoj de la franca lingvo. Tio estas precipe pro tio, ke laŭ *Waringhien* (1959, p. 63) la prefikso *mal-* akiris ĝian sencon el la franca kaj la itala. Ŝajnas do, ke tiu el la du kontraŭaj vortoj kiu estis preskribita kiel radiko kaj kun kiu estas kunmetita la prefikso, dependas parte de vortofarado observata en tiuj ĉi du lingvoj. La studo celas akiri du tipojn de distribuoj, nome tiun distribuon kiun montras *mal*-prefiksigo de diversaj paroj da kontraŭaj vortoj kaj tiun distribuon kiun franclingvanoj montros kiam ili estos juĝantaj unu aŭ alian membron de tiuj vortparoj kiel primara.

Metodo

Partoprenantoj

Partoprenantoj estis 50 studentoj, 25 viroj kaj 25 virinoj, el Universitato de *Alberta, Edmonton*, Kanado. Ili ĉiuj estis personoj kiuj parolas la francan lingvon.

Materialoj

Francaj ekvivalentoj al la japanaj kaj anglaj vortoj antaŭe uzitaj (*Nagata*, 1977) estis alprenataj. Tabelo 1 prezentas parojn da vortoj laŭ la du vortospecoj: adjektivo kaj verbo. La adjektivoj estis ordigitaj en tri klasojn laŭ la du kriterioj de kunteksta neŭtraligo. Dek-ok adjektivoj estis konformaj al ambaŭ kriterioj, kvin al unu kriterio kaj la ceteraj 12 al neniu kriterio. Kvin paroj da verboj, kies Esperantaj ekvivalentoj estas rilatigeblaj per *mal-*, estis ankaŭ uzataj.

Procedo

Kvardek paroj da kontraŭaj vortoj estis hazarde listigitaj sur folio. La partoprenantoj estis petataj indiki unu el la du kontraŭaj vortoj kiun ili konsideris primara. La partoprenantoj estis petataj plenumi la taskon kiel eble plej rapide laŭ siaj unuaj impresoj.

Rezultoj

Distribuo de la prefikso *mal-*

La kolumno etiketita "Ne-markita" en Tabelo 1 konsistas el ne-markitaj membroj de la paroj distingeblaj per ambaŭ aŭ unu el la kriterioj de kunteksta neŭtraligo. La paroj estas listigitaj en la ordo malkreskiganta de la nombro de partoprenantoj, kiuj elektis la ne-markitajn membrojn kiel pri-

Tabelo 1 : Paroj da kontraŭaj vortoj francaj, ties Esperantaj ekvivalentoj, nombroj de partoprenantoj juĝintaj ĉiun vorton kiel primaran aŭ neprimaran, kaj CR ($p < .01$, *$p < .05$)**

Franca lingvo		Esperanto		Nombro de partoprenantoj		
Ne-markita	Markita	Ne-markita	Markita	Ne-markita	Markita	CR
Adjektivoj - *Ambaŭ kriterioj*						
lumineux	*assombri*	brila	malbrila	50**	0	7.07
généreux	*avare*	malavara	avara	50**	0	7.07
dur	*tendre*	malmola	mola	49**	1	6.79
actif	*passif*	aktiva	pasiva	49**	1	6.79
vivant	*mort*	viva	morta	49**	1	6.79
bon	*mauvais*	bona	malbona	49**	1	6.79
sain	*fou*	mensosana	freneza	49**	1	6.79
épais	*fin*	dika	maldika	49**	1	6.79
vrai	*faux*	vera	malvera	48**	2	6.51
haut	*bas*	alta	malalta	48**	2	6.51
orgueilleux	*humble*	aroganta	humila	45**	2	6.27
propre	*sale*	pura	malpura	47**	3	6.22
fort	*faible*	forta	malforta	47**	3	6.22
long	*court*	longa	mallonga	47**	3	6.22
profond	*creux*	profunda	malprofunda	47**	3	6.22
sauve	*dangereux*	maldanĝera	danĝera	47**	3	6.22
large	*étroit*	larĝa	malllarĝa	45**	3	6.06
serré	*relaché*	streĉita	malstreĉita	43**	6	5.29
Unu kriterio						
beaucoup	*peu*	multa	malmulta	50**	0	7.07
difficile	*facile*	malfacila	facila	49**	1	6.79
vieux	*jeune*	maljuna	juna	46**	4	5.94
loin	*proche*	malproksima	proksima	43**	7	5.09
grand	*petit*	granda	malgranda	22	28	0.85
Neniu kriterio						
mental	*physique*	mensa	korpa	50**	0	7.07
semblable	*différent*	simila	malsimila	49**	0	7.00
noir	*blanc*	nigra	blanka	49**	1	6.79
eveillé	*endormi*	maldorma	dorma	48**	2	6.51
lourd	*léger*	peza	malpeza	46**	4	5.94
nouveau	*vieux*	nova	malnova	44**	6	5.37
gros	*mince*	dika	maldika	43**	7	5.09
au-dessus	*au-dessous*	supra	malsupra	40**	9	4.43
premier	*dernier*	unua	lasta	40**	10	4.24
gauche	*droite*	maldekstra	dekstra	35**	15	2.83
devant	*derrière*	antaŭa	malantaŭa	33*	17	2.26
fermé	*ouvert*	fermita	malfermita	28	22	0.85
Verboj						
découvrir	*couvrir*	malkovri	kovri	48**	2	6.51
vaincre	*perdre*	venki	malvenki	47**	3	6.22
réussir	*échouer*	sukcesi	malsukcesi	46**	3	6.14
defendre	*permettre*	malpermesi	permesi	46**	4	5.94
apparajtre	*disapparaitre*	aperi	malaperi	44**	6	5.37

maraj. Paroj da adjektivoj ne distingeblaj per markiteco kaj paroj da verboj estas enigitaj en unu aŭ alian kolumnon laŭ grandaj nombroj de partoprenantoj, nome: tiuj vortmembroj kiujn ili juĝis kiel primaraj estas listigitaj en la kolumno etiketita "Ne-markita", denove en malkreskiganta ordo. La kolumno etiketita "Markita" konsistas el markitaj membroj distingeblaj per markiteco plus adjektivoj kaj verboj, kiuj ne estis distingeblaj per markiteco kaj kiuj estis juĝitaj kiel ne primaraj.

La tria kaj la kvara kolumnoj prezentas esperantajn parojn da kontraŭaj vortoj respektive al la francaj en la unua kaj la dua kolumnoj. Troviĝis, ke la 18 paroj da adjektivoj kiuj plenumas ambaŭ kriteriojn klasiĝis en tri kategorioj. La unua kategorio inkluzivis 11 parojn kiuj konformiĝis al la lingvistika markiteco, nome: la markitaj membroj de tiu ĉi kategorio portas la prefikson *mal-*. La dua kategorio inkludas tri parojn, kiuj staras kontraŭ la markiteco. Ne-markitaj membroj de tiuj ĉi paroj portis la prefikson *mal-*. La tria kategorio konsistis el kvar paroj da adjektivoj, al kies membroj estas preskribitaj apartaj vortoj.(4)

Rilate al la dua grupo (kiu obeis al unu kriterio) du el kvin paroj konvenis al markiteco, dum la ceteraj tri staris kontraŭ ĝi. Analizo per la lingvistika markiteco nek eblis pri la tria grupo de adjektivoj, kiuj plenumis neniun kriterion, nek pri la kvara grupo de kvin verboj.

Juĝado de partoprenantoj

La kvina kolumno de Tabelo 1 prezentas la nombron de partoprenantoj kiuj elektis kiel primara la ne-markitajn membrojn de la vortparoj, kaj la sesa kolumno la markitajn vortmembrojn. Kritikaj Proporcioj (angle: *Critical Ratio: CR*) estis kalkulataj por testi ĉu la nombro de partoprenantoj signifike superis la nombron hazarde atendeblan. Ĉiuj ne-markitaj membroj kiuj plenumis ambaŭ kriteriojn estis juĝitaj kiel primaraj, tute konforme al la lingvistika markiteco.

Pri kvar el kvin paroj kiuj kontentigis unu kriterion, ne-markitaj membroj estis juĝitaj kiel primaraj. Plue, la partoprenantoj juĝis kiel primaraj unu aŭ alian membron ne nur el la paroj de 11 el 12 adjektivoj kiuj ne obeis la kriteriojn, sed ankaŭ el tiuj de kvin verboj.

Diskuto

Rilate *kaj* al ĉiuj adjektivoj kiuj plenumas ambaŭ kriteriojn de kunteksta neŭtraligo *kaj* al kvar el kvin adjektivoj, kiuj plenumis unu kriterion, ne-markitaj membroj estis juĝataj kiel primaraj. Tio ĉi indikas, ke la lingvistika markiteco bone prognozas juĝadojn de la partoprenantoj. Evidentiĝis do, ke vortofarado de Esperanto estas plejparte preskribita konforme al du

tipoj de taksadkriterio kiujn ni alprenis ĉi tie, nome: lingvistika markiteco kaj juĝado de parolantoj. Tamen necesas rimarki samtempe, ke troviĝis kelkaj paroj pri kiuj prefiksigo per *mal-* kontraŭstaras al tiuj ĉi taksadkriterioj. Specife, *mal-* estas kunmetita kun ne-markitaj membroj ĉe 6 paroj (malavara-avara, malmola-mola, maldanĝera-danĝera, malfacila-facila, maljuna-juna kaj malproksima-proksima). Krome, al ĉiu membro de la kvar paroj da adjektivoj (aktiva-pasiva, viva-morta, mensosana-freneza kaj aroganta-humila) estis donitaj apartaj vortoj, spite al tio ke estus pli akceptinde ne nur lingvistike, sed ankaŭ psikologie, se membroj de tiuj ĉi paroj da kontraŭaj vortoj estu rilatigitaj inter si per la prefikso *mal-*.

Pri la adjektivoj kaj verboj, kiuj plenumis neniun kriterion, plejparto da prefiksigo per *mal-* konformiĝis al la subjektivaj juĝadoj de franclingvanoj, kvankam troviĝis kvar paroj (maldorma-dorma, maldekstra-dekstra, malkovri-kovri kaj malpermesi-permesi) kiuj kontraŭstaris al iliaj juĝadoj.

La nunaj trovaĵoj pri la juĝadoj de franclingvanoj rilate al la adjektivoj, kiuj plenumis ambaŭ kriteriojn, estas tre konformaj al tiuj observitaj de *Hamilton & Deese* (1971) ĉe anglalingvanoj. Ni povus tial diri, ke parolantoj de la du lingvoj pritraktas tiujn ĉi adjektivojn laŭregule de io, kio korelacias, kvankam ne identa, kun la lingvistika markiteco. Tiu ĉi interpretado aplikiĝas ankaŭ al la adjektivoj plenumantaj unu kriterion en la franca kaj la angla, ĉar kvar el kvin paroj da tiuj adjektivoj estis konformaj al la lingvistika markiteco en la franca kaj kvin el ses paroj da ili en la angla. (Escepto estas *grand-petit* = granda-malgranda en la franca, kaj *old-young* = maljuna-juna en la angla). Kompare kun la supraj du lingvoj, konformeco inter subjektivaj juĝadoj kaj lingvistika markiteco estis malpli rimarkinda ĉe japanlingvanoj, ĉar kvin el 18 adjektivoj plenumantaj ambaŭ kriteriojn kaj tri el kvin adjektivoj plenumantaj unu kriterion ne konformigis sin al la markiteco. Ni tamen devas noti, ke granda korelacio aperis inter la lingvistika markiteco kaj la juĝado de parolantoj de tri malsamaj lingvoj.

Zamenhof (1887) elpensante la vortofaradon de Esperanto alprenis la regulon, ke "ĉiuj vortoj, kiuj jam fariĝis internaciaj..., restas en la lingvo internacia neŝanĝataj" (p. 233) kaj kreis la vortaron ne arbitre "sed kiom eble el vortoj konataj al la tuta klera mondo" (p.238) kaj "egale uzataj en ĉiuj civilizitaj lingvoj" (p.238). Konsidere la fakton, ke ne-markitaj membroj de kontraŭaj vortoj estas ĝenerale pli ofte uzataj ol markitaj membroj en parolkomunumoj (*Greenberg*, 1966), ni povas diri, ke li elektis trafan vojon. Meritas do mencii, ke lia vortofarado, almenaŭ koncerne *mal*-kontraŭvortojn, estas grandparte konforma al niaj kurantaj du taksadkriterioj. Aldonindas tamen, ke lia regulo ne ĉiam kongruas kun niaj taksadkriterioj, kiel ni vidis supre.

Oni povus rimarki (laŭ *Vilborg*, 1989, 1991, 1993, 1995), iom da influo de la franca sur la decido de *Zamenhof* pri radikoj de *mal*-kontraŭvortoj, precipe pri tiuj paroj kiuj staris kontraŭe al la lingvistika markiteco kaj/aŭ al la juĝadoj de parolantoj (ekz. avara-malavara, danĝera-maldanĝera, facila-malfacila, juna-maljuna, dorma-maldorma, kovri-malkovri kaj permesi-malpermesi). Ne eblas tamen determini, ĉu en eŭropaj landoj en la lasta duono de la 19-a jarcento francaj ekvivalentoj de ĉi-supraj esperantaj radikoj pli ofte okazis ol siaj respektivaj kontraŭparoj. La nuna aŭtoro estis atendinta, antaŭ ol alpaŝi al tiu ĉi studo, ke pri la supraj sep paroj franclingvanoj estus verŝajne juĝontaj vortomembrojn sen *mal-* (ekz. *tendre* : mola) kiel pli primaraj ol tiujn kun *mal* (ekz. *dur* : malmola). Tiu ĉi supozo, tamen, ne estis subtenata. Aliajn faktorojn ol nuran frekvencon de *mal*-kontraŭvortoj ni devus ankaŭ konsideri. Ĉi tiuj denove inkluzivus aŭ la teorion de L-spaco (*Clerk*, 1973) aŭ takseblecon de trajtoj entenataj de radikvortoj (*Osgood, Suci & Tannenbaum*, 1957; *Hamilton & Deese*, 1971). Aparte gravus taksebleco, ĉar ĝi certe submetiĝas al la influo de kulturaj cirkonstancoj samtempaj.

Resume, la nuna esploro trovis, ke franclingvanoj juĝis preskaŭ ĉiujn membrojn de la vortparoj da kontraŭaj adjektivoj francaj kiel primaraj, kiuj plenumas unu aŭ ambaŭ lingvistikajn markitecojn. Vortofarado koncerne la prefikson *mal-* konvenis plej ofte al la markiteco tiel, ke markitaj membroj estis prefiksitaj *mal-*, kvankam troviĝis samtempe kelkaj paroj da adjektivoj kies ne-markitaj membroj estis prefiksitaj *mal-*. Krome, troviĝis ankaŭ paroj kies membroj ricevis apartajn vortojn. Aliaj adjektivoj kaj verboj, kiuj ne distingeblis per la markiteco, statis tiel, ke membroj sen *mal-* estis pli ofte juĝataj kiel primaraj ol siaj kontraŭparoj. Tamen ree troviĝis tiuj vortparoj kiuj kontraŭstaris al prijuĝado de parolantoj. La influo de la franca lingvo sur la vortofarado de *mal*-kontraŭvortoj en Esperanto estas rimarkebla; tamen frekvenco kiel faktoro determinanta radikon de *mal*-kontraŭvortoj restis neklara.

Referencoj

Clark H.H. (1973). Space, time, semantics, and the child. En *T.E. Moore (red.), Cognitive development and the acquisition of language (p.27-63). New York, Academic Press*

Greenberg J.H. (1966). Language universal. The Hague, Mouton.

Hamilton H.W. & Deese J. (1971). Does linguistic marking have a psychological correlate? Journal of Verbal Learning and Verbal Behavior, 10, 707-714.

Kalocsay K.& Waringhien G. (1985). Plena analiza gramatiko de Esperanto. Rotterdam, Universala Esperanto-Asocio.

Nagata H. (1977). Linguistic and psychological evaluation of word derivation in Esperanto with a special reference to the prefix mal-. Bulletin of the Faculty of Law and Literature, Okayama University, 38, 41-49.

Osgood C.E. (1980). Lectures on language performance. New York, Springer-Verlag.

Osgood C.E., Suci G.J. & Tannenbaum P.H. (1957). The measurement of meaning. Urbana,

Illinois; University of Illinois Press.
Vilborg E. (1989, 1991, 1993, 1995). Etimologia Vortaro de Esperanto. Malmö, Eldona Societo Esperanto.
Waringhien G. (1959). Lingvo kaj vivo: Esperantologiaj eseoj. La Laguna, J.Régulo.
Zamenhof L.L. (1887). El la unua libro de la lingvo Esperanto. En *L.L. Zamenhof,* Fundamenta Krestomatio (p. 228-239), 17a eldono 1954, *Rickmansworth, The Esperanto Publishing Company, Ltd.*

Notoj

(1) La nuna studo estis farita antaŭ pli ol dudek jaroj, tamen restis netuŝite ĝis nun pro ties rezultoj ne konformaj al la antaŭvido de la aŭtoro (vd. Diskuton en la teksto). Okaze de neatendebla forpaso, la 24a de januaro 1999, de profesoro *Bruce Bain* ĉe Universitato de *Alberta, Edmonton,* Kanado, mi decidis redakti artikolon por la studo. Li bonkore tradukis la anglajn vortomaterialojn en la francan lingvon kaj prizorgis tutan aferon necesan por akiri datumojn el franclingvanoj. Al li mi volas omaĝi per dediĉo de tiu ĉi artikolo.

(2) La "teorio de L-spaco" koncernas lingvan spacon kiun evoluigas unuopuloj dum siaj kreskadoj rilate al la konceptoj pri perceptebla spaco. Ĉar ili naskiĝis en specifa naturmedio de ebena mondo kun gravito, ili prikonstruas percepteblan spacon kiu limigas kaj preskribas definitivajn ecojn lingve esprimeblajn. Tiel, se la ternivelo estas la normnivelo, tiam *supre* estas pozitiva kaj *malsupre* negativa; kaj se la vertikala, dekstra-maldekstra nivelo tra la homkorpo estas alia normnivelo, tiam *antaŭ* (la korpo) estas pozitiva kaj *malantaŭ* negativa.

(3) La koncepto de semantika trajto de taksebleco rilatas al afekcia signifo (*affective meaning*) kiu rolas plej grave kiam oni juĝas kiujn ajn objektojn inkluzive vortojn. Tiun ĉi trajton klare videbligas sekvantaj paroj da adjektivoj, *good - bad* (bona - malbona), *beautiful - ugly* (bela - malbela), *sweet - sour* (dolĉa - acida), *clean - dirty* (pura - malpura) *valuable - worthless* (multvalora - senvalora) kaj simila (*Osgood, Suci & Tannenbaum,* 1957). Vd. ankaŭ *Osgood* (1980) pri rilata koncepto, afekcia negativeco (*affective negativity*).

(4) Se la kontraŭvorto de *humila* estu *malhumila* anstataŭ *aroganta,* tiam la nombro de paroj kontraŭstarantaj al la lingvistika markiteco grandiĝos po unu kaj laŭ tio malgrandiĝos po unu la nombro de paroj kiuj ricevas apartajn vortojn.

Adreso de la aŭtoro

Prof. NAGATA Hiroshi, Faculty of Economics,
Okayama University, Tsushima-naka
JP - Okayama - 700-8530 / JAPANIO
<hinagata@e.okayama-u.ac.jp>

Priaŭtora informo

Prof. *Nagata* laboras pri psikolingvistiko, sin tut nante precipe al akirado de denaskaj lingvoj, homa prilaborado de frazoj kaj stato de lingvoscio atingita fare de plenkreskuloj.

Scienca Revuo Vol. 51 (2000) (3)

Baza premiso por la scienca leksiko de Esperanto

J. KAVKA

Enkonduko

Dum longa tempo (iom pli ol duona jarcento) okupis min la scienca leksiko de Esperanto. La jardekoj instruis min tre konvinkive, ke apenaŭ eblas sukcesi ĉi-kampe, se oni nesufiĉe regas la lingvojn grekan (helenan) kaj latinan. La kreinto de Esperanto bone konsciis, ke el tiuj ĉi du lingvoj necesas ĉerpi unuavice, se temas pri sciencoj. Ĉiu leksikologo, transpreninta de li la stafeton, procedis aŭ pli aŭ malpli bonŝance: tio dependis de lia lingva erudicio. La ĝisnuna rezulto estas do iom dubinda; mi nepre ne aŭdacus nomi ĝin planlingva. Helpe de sekvaj ekzemploj mi provu demonstri la situacion.

1. Fonetiko

Zamenhof klopodis - laŭeble konsekvence - distingi inter jenaj du grekaj fonemoj: *kappa* (K) kaj *khi* (Ĥ), por eviti gravajn konfuzojn. Latino redonas la fonemojn per *C* (antaŭ *A, O, U*) kaj per la digramo *CH.* Bedaŭre, tiu Ĥ baldaŭ embarasis la frankofonan kaj anglofonan publikojn.

Kvankam profesoro *Waringhien,* la ĉefredaktoro de PIV (1970) koncedis, ke Ĥ gravas en sciencaj terminaroj, li havis malfacilaĵojn, se li prononcadis ĝin. Kiu havis okazon lin aŭskulti, povas konfirmi, ke sole el kunteksto eblis distingi, ĉu temis pri oro, ĉu pri horo, ĉu pri ĥoro. Male, araboj, germanoj, hindoj, nederlandanoj, slavoj, sudafrikanoj kaj multaj aliaj trovas la "malbenitan" fonemon Ĥ senproblema.

Min mem, la rolo de Ĥ interesis delonge. Apartan traktaĵon mi dediĉis al ĝi en 1980 kaj poste ĝin tuŝadis plurfoje, ekz. en 1981, 1982, 1997. Ĉiloke, mi limigos min sole al tre malmulto da ekzemploj.